# Pola Esperantisto
# Esperantysta Polski

| XXXII JARO | NRO 2 | FEBRUARO 1938 |
|---|---|---|

ELDONANTO — WYDAWCA
POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY
PROF. DR ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

## ALVOKO.

Kiel statas nia afero en Pollando, sciastion ĉi ni ĉiuj. La lasta „Jubilea Kongreso" en Warszawa ne alportis esperitan plifortigon de nia movado. Kaj la kaŭzo de tiu ĉi stato kuŝas en ni mem, en nia sintetado al la kurantaj problemoj, kiujn alportas la ĉiutaga vivo. Kiel ekzemplo ni povas citi la problemon U. E. A.-I. E. L., kiu elvokis preskaŭ neniun eĥon inter niaj vicoj, eble tial, ke ĝi estis por multaj tro „fremda", iom malproksima. Sed ankaŭ nia enlanda „afero" de P. E. D. ekvekas nur malgrandan interesiĝon de la samideanoj.

Ni aŭdas ĉiujare riproĉojn, ke P. E. D. nenion faras, ke rezultoj de ĝia laboro estas nulaj, sed neniu pripensas ĝian kaŭzon. Kiel P. E. D. povas esti forta, kiel ĝi povas ion entrepreni, se en ĝiaj vicoj mankas tiom da grupoj?! Aliĝis al P. E. D. 19 da grupoj, pagas nur nelakurate 10 da grupoj, kie estas la resto. Malfacile estas supozi, ke la aliĝintaj estas ĉiuj ekzistantaj grupoj en Pollando!

Por esti forta P. E. D. bezonas ĉiujn, por agi sukcese P. E. D. bezonas subtenon kaj kunlaboron de ĉiuj esperantistoj en Pollando!

Ni atendas vian aliĝon, ĉar nur via kunlaboro helpos al sukceso de Esperanto!

## „KVINMIL-FONDO".

En numero 8—9 de „P. E." el 1937 j. samideano Pruski alvokis al realizo de la „kvinmil-fondo", kies starigon decidis la lasta jarkunveno de P. E. D. Al la vortoj, per kiuj li argumentis la neceson de tiu ĉi „fondo", aldoni ion ŝajnas al ni superflue. La alvoko ne restis sen respondo. Troviĝis jam samideanoj, kiuj komprenis, ke tiu ĉi „fondo", estas provizore la plej bona solvo de la organiza demando kaj sendis sian oferon por tiu ĉi kolekto.

Jen la listo:

Prof. dr Odon Bujwid, Kraków . . 20 zł
Kolektita dum Ĝen. Kunveno de P. E. D. en Warszawa (12 VIII 1937) laŭ iniciato de mgr Czesław Pruski, Lublin 11 zł
Dr Leon Rosenstock, Kraków . . . 10 zł
Pola Esperantista Klubo, Kraków . . 10 zł
Societo Esperanto, Kraków . . . . 10 zł
Franciszek Zontek, Jeziernica . . . 5 zł

Henryk Grunis, Majerowicz, Binsztok
R. Kleinówna, Kalisz . . . . . 3 zł
Józef Mróz, Nowy Bytom . . . . 2 zł
Jan Mazurkiewicz, Pruszcz-Bagienica . 2 zł

Sed tiuj ĉi sumoj estas nur malgranda ne paŝo sed „paŝeto“ kaj por efektivigo de la ideo estas necesa pli energia kaj pli vasta subteno flanke de la samideanoj. Ne nur kelkaj sed ĉiuj, ne nur individuoj sed grupoj, ne nur grandaj sed ankaŭ malgrandaj sumoj estas necesaj por tiu ĉi celo!

Tial deklaru, pagu, alvoku, propagandu la „kvinmil-fondon“ por intereso same via kiel de esperantista movado en Pollando!

*Estraro de P. E. D.*

# INTERŜTATA ESPERANTO-AKORDO.

**Ĉefa ideo:** Ses registaroj reciproke promesos: Ni enkondukos la instruadon devigan de Esperanto en ĉiujn lernejojn de nia lando, se vi promesos fari la samon.

**Gvidanto informa de la penado:** dro Antoni Czubryński, Włochy pod Warszawą, Wesoła 32, Polujo.

**Gvidantoj:** naciaj esp. asocioj, ĉiu en sia lando.

## INFORMA RAPORTO PRI LA ĜISNUNA LABORO.

### Iom de historio.

Pro tio, ke lastfoje mi konstatis el alsenditaj al mi leteroj, ke iuj samideanoj ne havas sufiĉe klarajn ideojn pri la kolektiva karaktero de IEAk-penado, kio povus eĉ kaŭzi miskomprenojn, mi donas ĉi-sube kelkajn klarigojn:

Laŭ tio, kion mi citis en mia broŝuro pri IEAk, eldonita de LKK de XXIX kongreso, kaj en maja nro 442 de ĝeneva „Esperanto“ oni povas konstati, ke tiu ideo tuj de naskiĝo estis transdonita al la tiama centro de nia movado, kiu en tiu periodo etis UEA kaj ICK kaj kiu klopodadis en la jaroj 1922—1927 realigi ĝin atingante partan sukceson (tri ŝtatoj aliĝintaj).

Dum la jaroj 1929—1936 pro la granda monda ekonomia krizo kaj intime kun ĝi ligitaj malfavoraj politikaj cirkonstancoj oni nenion povis fari.

Renovigante la klopodojn pri tiu ĉi ideo, mi kaj aliaj membroj de la LKK de la Jubilea, volante de ĝi fari kolektivan movadon, pri kiu ĉiuj klopodos prezenti la ideon al XXIX Esp. kongreso en Varŝavo, antaŭe informinte la institutojn registritajn al la kongreso pri la proponata Akordo. La rezoluciojn de la kunsidoj de TAGE en la tagoj 10 kaj 13 de aŭgusto, kiujn oni konkorde akceptis, ni poste prezentis al ĝenerala kunsido de la Kongreso por la diskuto kaj voĉdono la 14-an. Neniu kontraŭstaris. La rezoluciojn publikitajn poste en la gazetaro Esp., oni akceptis ankaŭ unuanime. Multaj samideanoj dum la kunveno de TAGE, kiu funkciis kiel lerneja sekcio de la kongreso kaj zorge studis la problemon, promesis labori en siaj landoj por IEAk.

Ni atentigas pri la rezolucio, kies fino estas: „La kongreso rajtigas sian Lokan Organizan Komitaton (LOK) funkcii kiel Realiga Komitato de la Kongreso (RKK) kaj komisias al ĝi informi la registarojn pri la laboroj kaj rezolucioj de la Kongreso“.

Do la problemo pri IEAk estas de nun la oficiala afero de la tuta esperantistaro.

Laŭ tio, kion oni decidis dum tiu kongreso la pezpunkto ne tiom ripozas en iu centro, kiu ĝis nun estas RKK, rajtigita de Kongreso sin okupi pri tiu ĉi penado, sed plej aŭtonomie agantaj naciaj (landaj) organizaĵoj, celantaj aliĝigi siajn registarojn por IEAk. Sekve la aliĝigo de iu lando al IEAk estas penado nur de ĉi-landaj organizaĵoj Esp.

Ni volas laŭ la deklaroj dum la kongreso, ke la klopodoj pri IEAk estu problemo de UEA-noj kaj IEL-anoj kaj de apartaj esperantistoj apartenantaj nek al unu, nek al alia, sekve de la esperantistaro tutmonda.

Ne volante sin per io ajn altrudi, aŭ intermiksi en la naciajn Esp. movadojn ni esperas, ke oni klopodos en ĉiu lando konforme al la deziresprimo de la Jubilea Kongreso konvinki la registaron de la koncerna ŝtato pri la utileco de la aliĝo al la poresperanta akordo.

Tio povas esti nur la afero de landa Esp. organizaĵo. Se tiuj organizoj havas ion kontraŭ la rezolucio akceptita de la Jubilea Kongreso, ni estus al tiu landa organizaĵo dankemaj, se ĝi bonvolus klarigi al ni siajn specialajn cirkonstancojn, kiaj ne permesas al ĝi kunlabori kun la landa esperantistaro por la realigo de la rezolucioj de Jubilea Kongreso pri la propagando de la IEAk.

Se iu landa organizaĵo opinias, ke oni sukcesos, postulante de siaj ministroj ta tujan enkondukon devigan de Esp. en ĉiujn lernejojn, sen la subteno de la postuloj per 5 aliaj ŝtatoj, oni provu tion fari. Ni certe tre ĝojos kaj gratulos.

Sed, se oni ne sukcesus, oni tamen farus

multe, se oni sukcesus minimume ricevi la promeson pri IEAk.

La Realiga Kongresa Komitato (RKK) de la Jubilea sciigis ĉiujn ŝtatojn pri la rezolucioj de la Kongreso.

**Kio ĝis nun estas farita?**

1) Oni dissendis la informan broŝuron pri IEAk al ĉiuj Lingva- Komitatanoj kaj Akademianoj, al la Esp. gazetaro, al naciaj (landaj) Esp. organizaĵoj, al preskaŭ ĉiuj delegitoj de UEA kaj IEL precipe en Eŭropo, ĝis kiam permesis la provizo de la jam tute elĉerpita broŝuro. Se iu nacia organizaĵo opinias, ke estus bone dissendi en la lando pluajn ekzemplerojn, ĝi povas presi broŝurojn, kompreneble post forigo de preseraroj, kaj interkonsentinte pri necesaj ŝanĝoj kun la aŭtoro, kiu rezignis por bono de la propagando pri la aŭtorrajtoj.

2) Oni sendis informajn kaj raportajn artikolojn al ĉiuj ĉefaj organoj de UEA kaj IEL kaj aliaj.

3) Oni sendis multon da informaj cirkuleroj al naciaj organoj kaj privataj leteroj al diversaj agantoj.

Kun speciala zorgo kaj atento ni klopodis, ke 50 kelkaj registaroj estu informitaj pri la IEAk ideo kaj rezolucio akceptita dum la Jubilea Kongreso. France redaktitaj, ĉiu alimaniere laŭ ŝtataj kondiĉoj ili iris en ĉiun landon de la terglobo. Al svisaj kantonoj, al ŝtatoj de Usono kaj Kanado, kie la Publika Instruado ne estas centraligita oni sendis specialajn leterojn. Laboro grandega kaj multekosta. Ne ĉiuj ŝtatoj kvitancis ricevon. Sed inter la respondoj estis kelkaj favoraj kaj atendindaj.

**La semoj kaj la ĝermoj.**

El tiuj multaj semoj komencas jam elkreski ĝermoj. Ideo komencas esti popularigata. Jam oni komprenas ideon pri IEAk, sed estas rimarkebla ankoraŭ ia nesufiĉa moviĝemo kaj kuraĝo de landaj organizaĵoj klopodi ĉe iliaj registaroj, ke ili aliĝu al IEAk. Oni atendas iun fakton, kiu povus esti trumpeta veksignalo por la dormantaj kavaliroj de la verda stelo.

Tiuj paŝoj estos verŝajne entreprenataj en du ŝtatoj. Kia estas la efiko, oni momente ne povas antaŭvidi. Oni povas kaj devas tamen dum tiuj klopodoj citi Hungarujon, kies ministro de klerigado, grafo Kuno von Klebersberg komisiis al ministro por ekstero Ludoviko Valkò subskribi la Akordon en Ĝenevo (nro de akto 15622/1928). Ĉiu nova aliĝo al IEAk faciligos la pluajn, ĉar ĉiu nova ŝtato aliĝonta ne sentos sin izolita kaj pro tio des pli kuraĝe donos sian subskribon.

Kun speciala peto kaj atento mi turnas min al italaj samideanoj. Laŭ la kompilitaj sciigoj kaj informoj pri IEAk-stato en la mondo, kaj speciale Eŭropo, estas sufiĉe antaŭvideble, ke la aliĝo de Italujo al IEAk, se ĝi estus akirebla, havus grandegan influon precipe je Meza Eŭropo, Norda Afriko kaj plue je la tuta mondo. Tiu aliĝo estus ora karto en la tuta IEAK-penado. La kaŭzojn mi klarigis jam al italaj samideanoj al mi konataj, sed estus preferinde momente ilin ankoraŭ ne publikigi, ĝis kiam la afero estos tute matura (se ĝenerale la tuta aliĝo de Italujo estos ebla). Tial per ĉiuj fortoj oni devas subteni la Esp. movadon kaj speciale IEAk-penadon en Italujo el ekstere, ĉar post tiu aliĝo de Italujo eble la duono de la plej malfacila laboro estos forlavangita. La plua estos multe pli facila. Tial multajn niajn esperojn ni konstruas sur tiu lando. Tie unue ni sendis la informajn broŝurojn pri IEAk kaj la tiea E-movado estas preta ĉion eblan fari por helpi tie al sukcesigo de IEAk-ideo, sed ni ne povas nin intermiksi en la internan agadon de niaj italaj samideanoj. ĉar ĝi dependas kiel ĝenerale ĉiu nacia Esp. agado nur de ili, ne de ni. Bedaŭrinde el tiu ĉi lando ni ne havas ankoraŭ sufiĉe da informoj.

**Petoj:**

Ni petas informi nin pri la laboroj jam faritaj; pri la popularigaj artikoloj pri IEAk, pri la prelegoj kaj preparoj al la laboroj ĉe la registaroj. Ni nenion altrudos, sed ni volus havi klaran bildon pri la ĉiam sin ŝanĝanta situo de IEAk-penado en la mondo.

Kun speciala peto mi turnas min al la migrantaj agantoj, Lidja Zamenhof, Kola Ajayi, Jozefo Scherer kaj aliaj kun afabla peto popularigi ideon pri IEAk, kiu estas laŭ rezolucio de Jubilea la agad-direktivo de la tuta mondo esperantista.

Ni deziras havi en ĉiu lando adresojn de la samideanoj, kiuj sub la kontrolo de nacia organizo kaj ĝiaj aŭspicioj laborus speciale pri aliĝigo de koncerna lando al IEAk.

Aŭstraliaj samideanoj povus helpi al popularigo de IEAk-ideo en specialaj rondoj okupiĝantaj pri la propono de parlamenta senatano Macartney Abbot por konkordigi lian proponon kun IEAk-ideo laŭpove.

Esp. katolikaj agantoj partoprenontaj en eŭkaristia kongreso en Budapest povus jam nun pripensi la preparajn laborojn, por ke en estonteco la Eklezio Katolika kun ĝia tra la tuta mondo dissemita lernejaparato aliĝu al IEAk.

**Universalaj kongresoj kaj IEAk.**

Estus dezirinde akcepti kiel principon aranĝi pluajn universalajn kongresojn en

tiuj landoj, kies registaro povus plej verŝajne aliĝi al IEAk, kiu dum ĉiuj kongresoj venontaj (kiom ajn ili ankoraŭ estos) devas esti en la tagordo kiel unu el la ĉefproblemoj diskutotaj. Kongreso forpasas post unu semajno, sed la aliĝo de la ŝtato al IEAk estos daŭra rezulto. Antaŭkongresan tempon kaj propagandon oni devas elprofiti por sukcesigi IEAk-ideon en la koncerna lando.

Laŭ la sciigoj ricevitaj ankoraŭ dum Jubilea Kongreso, la ideo pri IEAk ne estas en Britujo pro decentriga karaktero de publika instruado tiel same aplikebla, kiel en aliaj landoj, kie tiu instruado estas en la mano de unu ministerio. Britujo postulas alian taktikon, kiun oni lasu efektivigi al britoj, kvankam por Britujo ne estas sensignifa, se iliaj penadoj estus submasonitaj el eksterlande per aliaj ŝtatoj kiuj aliĝus al IEAk. Malgraŭ tiuj ĉi aliaj kondiĉoj mi opinias, ke la alproksimiĝantan londonan kongreson oni povus elprofiti por la apliko de tiu ĉi taktiko, kiun britoj opinias kiel la plej bonan ĉe si. Estus granda peko, se oni tion ĉi ne farus.

*Dro Antoni Czubryński.*

WŁADYSŁAW ST. REYMONT.

# VENUS.

La nokto leviĝadis de oriento kaj ankoraŭ iris kaŝe, sed jam kovretadis per naĝiloj profundajn fosaĵojn, malproksimajn kampojn, pupilojn de lagoj kaj komencis enverŝiĝadi per malpuraĉaj ĉifonoj de krepusko kaj ŝuti sur la teron etan, pluvon penetrantan per malvarmo — kaj malrapide privolvis per malpuraj rulaĵoj, vilaĝojn, skeletojn de arboj, malplenajn kampojn, krucojn, kiuj mukajn, nigrajn, lacajn armojn etendadis al la ĉielo sur montetoj kaj vojdisiĝoj

Kaj malantaŭ la nokto, kvavaŭ hundo penetradis vento kaj ĉirkaŭkuradis kampojn, transruliĝadis kun fajfo sur moliĝintaj terplugaĵoj, batis en lagojn, ĝis ili malkovris sian fundon, balais kotajn vojojn, baraktis kun pirujoj sur interkampoj, elŝiradis pajlogarbetojn, silentis dum momento kaj ŝtelire frapis vandojn de arbaroj, starantaj ĉirkaŭe; mord-eniĝadis hurlante en amasojn de malmildaj arbaroj kaj ŝiris lastajn foliojn de flavaj poploj kaj ruĝaj fagoj — kaj retiriĝadis terurita per krepuska trankvilo de profundaĵoj kaj malserena meditado de grandegulój, retiriĝadis kun ĝemado, volvumis kaj ĵetadis sin kun rabio kontraŭ la maljuna, kuŝanta en valo apud la rivero, parko; kontraŭ la ruino de parko kun verdaj okuloj de prikreskitaj lagoj, kun breĉhavaj, putroplenaj aleoj, kun gazonoj kaj herboplektaĵoj, trançitaj je kampulaj kampstrioj; kontraŭ la kadavro de la parko, kie inter la piedpremitaj herboj kaj rompitaj arboj blankis marmoraj korpoj de faŭnoj, arbarviroj, driadoj, bakanalaninoj kaj diaĵoj.

La nokto paŝis senhalte kaj frapetis per ĉiam pli densa pluvo. Lastaj aroj da kornikoj flugis kun krio al arbaroj, pendiĝadis sur skeletoj de arboj, sursidadis blankajn kapojn de la diaĵoj kaj grakadis — longe kaj plendeme; kaj poste rondflugis kiel nubo super ŝiritaj muroj de l'palaco, kroĉadis sin al renversitaj muroj, pendis sur frakasita kolonoj, faladis sur ruinigitajn balkonojn sur restaĵojn de tegmentoj kaj turetoj kaj malaperadis en interno de la ruino, en orbitoj de l'palaco, kiu rigardis tiun nokton novembran, en fantomajn konturojn de arboj rompitaj de ventegoj, en longajn aleojn, videbletantajn en krepusko, la frakasitajn marmorojn de fontanoj, renversitajn tombojn, malhelajn profundaĵojn de densaĵoj, verdajn putrintajn lagojn kaj vicojn de faŭnoj, arbarviroj, driadoj, bakanalaninoj, diaĵoj kaj ĥimeroj — la tutan tumulton de korpoj ŝanceliĝantaj sur ŝimaj trunkoj, kaj tra la verda krepusko dolore blankantaj per senvesteco; la tutan tumulton de diaj korpoj deŝiritaj, vunditaj morddifektitaj de pluvoj kaj frostoj, senmanaj, kriplaj, muskokovritaj, kadavraj; la tutan tumulton de diaj mizeruloj, agoniantaj en malvarmo, malpureco kaj malbeleco de novembra nokto, fiksrigardantaj per ŝtonaj okuloj al Venus

La pluvo faladis senĉese kaj per malvarmaj torentetoj malsuprenfluis sur la dia vizaĝo de Venus, elmordadis ŝiajn okulojn fiksrigardantajn ne sondeblan foraĵon, kaj defluis per malpuraj strioj sur severa, nepardonema, fiera buŝo al vundita torso, al manoj disbatitaj per ŝtonoj de paŝtistoj, al koksoj breĉitaj per akraĵoj de vilaĝanaj poŝtranĉiloj, al la tuta senmorta korpo plena de vundoj, strioj de vipofrapoj, koto, makuloj kaj ŝimo.

La sovaĝa lupolo ĉirkaŭprenis ŝiajn piedojn per voluptaj tordoj kaj malpuraĉigis ŝian dian sinon, kaj grandaj tremoloj, starantaj ĉirkaŭe, tremis ĉiam en kolero kaj ŝutis sur ŝian kapon putrajn foliojn kaj brutece batis ŝin per branĉoj, kaj la vojo, situanta malantaŭ ŝi, priĵetadis ŝin per koto, kaj la kadavro de la palaco ĵetadis kontraŭ ŝin ru-

baĵon, kaj la pluvo kraĉis sur ŝian dian nudecon.

La nokto levadis la hirtigitan per ventegoj kapon kaj skuis ĝin ĉiam pli forte — ĝis krakis arboskeletoj, ŝanceliĝis la muroj de l'palaco kaj obtuze bruis la malplenaj ĉambroj, kaj ĝemis malĝoje la tuta parko, kaj hurlis pro malvarmo kaj teruro maljunaj hundoj — senhejmaj, kiuj ĉi tien mortaĉi venadis; hundoj — izolaj, hurlantaj malespere al la foraj vilaĝoj, flagrantaj per fajretoj. — La forlasitaj hundoj.

La vento furiozis.

La nokto kovretis per putranta ĉifono de krepuskoj la mondon kaj diboĉadis kun sovaĝa ridaĉo de ventegoj sur kotaĵoj de vojoj, sur nudaj branĉoj de arboj, sur atlasoj de akvoj, sur ruinoj de l'palaco kaj sur blankaj korpoj de dioj — rulis sin kun ebriigo kaj blekadis per voĉo de uragano, kiu deŝiradis sin de ĉenoj, de tempo al tempo blekadis misaŭgure kaj komencis mordi, piedpremi kaj frakasi la mondon. La hundoj hurlis plendeme, la frakasataj arboj ĝemis, la ŝirataj muroj faladis kun obtuza bruo, kaj ĉio, kio vivis — suferis kaj ploris bedaŭre kaj petege.

Venus, kvieta en sia dia indiferenteco, rigardadis en la ne sondeblan foraĵon, tra tiu novembra nokto, tra tiu nokto tiel terura. Kaj la uragano, kvazaŭ ebria pro furiozo, ruliĝaĉis tra kampoj, interbaraktis kun la arbaro, premis, elŝiradis kaj rompadis, ĝis grandega ĝemo flugadis alte super la tero, kaj la krako de rompataj arbobranĉoj, kvazaŭ bruego de tondroj, eĥe etendiĝadis inter la ruinoj de l'palaco.

La tuta parko tremadis en spasmo de malespero, plendbojis, blekis kompaton, almozpetis pardonon, sed la uragano respondadis per hurlado, renversadis la murojn, elŝiradis el la tero tutajn aleojn kaj disĵetadis ilin en la parko, kiel plumojn, baraktadis kun larĝkreskaj kverkej kaj splitigadis ilin ĝis radikoj, kuntordadis sveltajn poplojn kvazaŭ mizerajn kanojn kaj batis per ili la diaĵojn, renversadis ilin sur la teron kun la trunkoj kaj dispremadis, kiel sekajn konkojn, kaj superŝutadis per koto, branĉoj, tero — kaj blindigite per rabio piedpremadis la blankajn korpojn kaj kuris frakasi Venuson!...

Furiozeco de ĥaoso ekregis la teron. La uragano hurlis per ĉiuj voĉoj de rabio kaj nokto. Estis nenio plu, krom unu grandega kirlo de mallumo, kiu rulis sin inter la ĉielo kaj la tero, blekis, ŝiris lignon kaj murojn, tumultis per grandega funelo, transflugadis la parkon kaj batis la arbarojn, kaj la arbaroj leviĝadis per terura vico, ne venkebla vico, lamentadis sovaĝan kanton de batalo kaj batis per kronoj la atakinton, kuŝigadis sin preskaŭ surtere kaj leviĝadis ree grandegaj, ne venkeblaj, teruraj, kaj la batalo daŭris plue, la baraktado daŭris kaj la pereigado daŭris.

Kaj inter la susuroj, balbutoj, krakoj, mallumoj, ploradoj de l'agoniantaj arboj, kaj inter la ĥaoso de la terura nokto, sonis la malmilda himno de faŭnoj, arbarviroj, driadoj, diaĵoj kaj ĥimeroj — malespera himno:

— Ho Venus! Ho senmorta! Ho patrino de dioj kaj homoj! Kompaton! Kompaton!

Venus rigardadis en la ne sondeblan foraĵon, severa rideto daŭris sur ŝia dia buŝo, per dia indiferenteco spiradis ŝia korpo plena de vundoj, ŝia korpo vipata de la uragano, ŝia korpo batata per branĉoj, per brikoj de la renversitaj ruinoj, per koto de la vojo, per ŝlimo de lagoj, per malvarmo, per ĉiuj potencoj de tiu terura nokto.

Kaj ree la frakasitaj torsoj, la torditaj korpoj, la piedpremitaj kapoj, la taŭzitaj je kaĉo diaj korpoj de faŭnoj, driadoj, bakanalaninoj kaj ĥimeroj — kantis grandan himnon per agoniantaj voĉoj, malesperigan himnon!

— Ho Venus! Ho senmorta! Ho patrino de dioj kaj homoj. Kompaton!...

Kaj Venus rigardadis la ne esploreblan foraĵon tra tiu terura nokto, Heladon, envolvitan en trankvilon de la lumanta luno, kiu per arĝenta nebulo prikovris suprojn de nudaj montoj, olivajn arbaretojn, cipresarojn, tra kiuj videbletiĝadis blankaj muroj de domoj kaj marmoraj portikoj de temploj; ŝi aŭskultadis dolĉajn flustrojn de torentoj, volviĝantaj tra odorplenaj arbaroj, sopirajn voĉojn de fluto, enverŝiĝantajn en trankvilon de tiu miraklobela nokto, varmegajn himnojn de amo, kiujn en la printempa aero kantadis ĉiuj kreaĵoj.

Kaj la nokto antaŭen paŝadis senhalte.

La uragano forpasis kaj okuloj de steloj komencis rigardadi el la profundaĵoj. Matenkrepusko pala, anemia, kun taŭzitaj matenruĝoj sur frunto, levadis pezajn palpebrojn de nuboj kaj rigardis per dormemaj, plorantaj pupiloj de matenruĝoj la malplenajn, mortajn kampojn, plenajn de pereo, la rompitajn arbarojn, enrigardis en malplenajn okulojn de l'palaco ĝis la profundaĵo de nudaj muroj, plenaj de ĉifonoj, tapetoj kaj restaĵoj de orumaĵoj, ĉirkaŭkuradis per briloj la premitan parkon, rompitan kaj mortintan, ĝi serĉadis diaĵojn, kiuj staris en granda duonrondo apud la lago, sed diaĵoj ne estis tie: faŭnoj, arbarviroj, driadoj, bakanalaninoj, diaĵoj kaj ĥimeroj — mortinte, putris en la koto superpremitaj per kadavroj de arboj. Ĝi serĉis Venuson! Kaj la patrino de dioj kaj homoj ne estis. Ne povis ŝin elŝiri la uragano mem, do ĝi elŝiris

kun radikoj iun arbon kaj ĵetis sur ŝin. Ŝi saltleviĝis de la trono, elŝiris sin el brakumoj du lupolo kaj falis surdorse en koton de la vojo kaj kuŝis, same fiksrigardanta la ne sondeblan foraĵon, same plena de dieco kaj majesto.

La tagiĝo, kvazaŭ terurite per grandego kaj pereiga potenco de l'nokto, disflamiĝis kaj per sangaj matenruĝoj superverŝis la mondon, kaj rigardis kun timego la kadavrojn kaj la pereon.

Kaj tiam el profundaĵoj de l'parko, de rompitaj diaĵoj, de frakasitaj diaj korpoj, de ŝtonaj buŝoj, eksplodis grandega krio, krio skuanta, lasta krio:

— Ŝi mortis! Ŝi mortis!

Ŝi mortis! Respondis eĥe arbaroj, kliniĝante ĝis piedoj de la leviĝanta tago. Ŝi mortis! Respondis eĥe la ne tutrompitaj arboj de l' parko kaj klinadis sin super la fosaĵo apud la vojo kaj rigardis la senmortan.

Ŝi mortis! Kantis sekaj, mizeraj kardoj, forskuante le pezajn kapojn de la roso, flustris la tero, ridaĉis la matena venteto, murmuris ŝvelantaj torentoj, kiuj elfluadis de la parko sur la vojon kaj rampadis al la diino, por leki ŝian korpon kaj ŝiri kaj mordi kaj kvazaŭ ĝenerala ĝojo ekskuis la teron, ke mortis tiu, kiu estis senmorta.

Kaj la tago ekfuriozis, la vizaĝo ŝprucigadis fajron kaj ekstaris en ruĝaj flamoj de brulego, nepardonemo; per lumo de juĝo kaj venĝo komencis lumi.

Timego traflugis super la mondo: birdoj eksilentis, arbaroj ekmallaŭtis, torentoj haltis, la tero kovriĝis timeme per nebuloj kaj sufoka mallaŭto ampleksis per maltrankvilo ĉiun estaĵon.

La tago klinis sian sangan vizaĝon super la Senmorta kaj bruliĝis en ŝiaj larĝe malfermitaj pupiloj ruĝajn brilojn, ĉirkaŭiĝis ŝian dian korpon per aŭreolo kaj kisis ŝiajn vundojn per roza buŝo de mateno, retiriĝis malantaŭ la nubojn, kiuj kvazaŭ kotaj, inunditaj vojoj, pendis sur la ĉielo; kaj ekploris per eta pluvo kaj verŝis larmojn sur la teron, plenan de grizeco, malvarmo kaj malĝojo.

Saviĝis nur unu el la bakanalaninoj, kiun iam vilaĝanoj ŝtelis de la parko, lokis en kavaĵo de potenca tilio, kovris ŝian senhontan nudecon per robetoj, pendigis sur ŝi rozariojn kaj florgirlandojn, ornamis per orumita, papera krono kaj preĝis al ŝi en majaj vesperoj kaj ŝi estis por ili protekta diaĵo.

Maljuna vilaĝano veturis kun knabo la vojon de la vilaĝo, antaŭ la bakanalanino li levis la ĉapon kaj pie krucsignis sin kaj ili plutreniĝis sur la kotiĝinta vojo.

-- Patro! Jen ĉi tie tiu nuda figuro kuŝas, rigardu ĝin! ni ne preterveturos...

— Stultulo! halt'! haltu...

Li deveturiliĝis en la koton kaj kun la vipo enmane li ĉirkaŭiris la diinon, poste de la veturilo prenis la hakilon, kraĉis en la manon kaj komencis per martelflanko forbati al ŝi la kapon...

Li forbatis, piedpuŝis per kotmakulita ŝuaĉo, ĝi deruliĝis en la fosaĵon...

— Venu, Maĉjo, ni enmetos la ŝtonon sur la veturilon, ĝi aplikeblos kiel sojlo de la kabano, aŭ eĉ kiel akrigŝtono.

Ili veturigis.

La piedoj, pritorditaj per bantoj de lupolo, restis en la koto, kaj la vundita kapo rigardadis el la fosaĵo, el sub la maldika tavolo de akvo, rigardis en la ne sondeblan foraĵon, rigardaris tra ĉio, malvarme kaj ne pardoneme. *Tradukis T. H.*

# XXX-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

## LONDON, 30 JULIO — 6 AŬGUSTO 1938.

### Oficiala Informilo N-ro 1 — 2.

**Organiza Komitato.** — Sekretario: C. C. Goldsmith. Help-sekretarioj: E. W. Amos kaj f-ino E. C. Goldsmith. Membroj: f-ino R. A. Davey (Prezidanto de la Londona Esperanto-Federacio), W. A. Gething (Konsilanto de B. E. A.), H. W. Holme (Prezidanto de la Londona Esperanto - Klubo), s-ino N. Holmes, Bernard Long (Honora Sekretario de B. E. A., Komitatano de IEL.), A. C. Oliver (Estrarano de IEL., Konsilanto de B. E. A.), Fred Wadham (Cefredaktoro de The British Esperantist), s-ino E. Warren (Sekr. de la Londona Esperanto-Federacio), R. B. Wilkinson (Sekretario de B. E. A.).

**Adreso por leteroj.** — Sekretario, 30a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

**Kongresejo.** — University College, Universitato de Londono.

**Kotizoj.** — Ĝis 31-3-38, £1-5-0; post 31-3-38, £1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj, pagas la duonon de ĉi tiuj sumoj. Estas oportune sendi kotizojn en registrita letero per britaj ŝtataj monbiletoj, haveblaj ĉe bankoj kaj monŝanĝejoj en multaj urboj. Se oni sendas pagojn per poŝtmandatoj, oni ĉiam sendu samtempe informon pri la **nomo kaj adreso de la sendinto** kaj la celo de la

pago, ĉar la brita poŝtadministracio ne skribas mesaĝojn sur poŝtmandatoj. La Poŝtĉekkonta sistemo ne ekzistas en Britujo. Ĉekoj kaj aliaj pagiloj estu pageblaj al Internacia Esperanto-Ligo.

**Blinduloj.** — Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos kongreskartojn senpage, sed iliaj aliĝoj devas esti aprobitaj de s-ro W. P. Merrick (kasisto de la Blindula Ligo), Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo.

**Aliĝiloj.** — Nun haveblaj ĉe la kongresoficejo, kaj ĉe la ĉefaj gazetoj kaj Landaj Asocioj.

**Donacoj.** — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por helpi al la plena sukceso de la Kongreso. Donacoj jam ricevitaj £10-17ŝ-3 p.

**Blindula Kaso.** — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu la Kongreson. Jam ricevitaj £17-9ŝ-2 p.

**Glumarkoj.** — Oni presis belajn kongresajn glumarkojn, kaj ili estas nun pretaj. Prezo por kvindek, 5 pencoj aŭ 2 internaciaj respondkuponoj.

**Loĝado.** — Kiel eble plej baldaŭ oni dissendos loĝmendilojn. Intertempe, povas esti, ke la jena informo utilos:

Hoteloj: lito kun matenmanĝo, po 4½ ĝis 14 ŝilingoj ĉiutage. (Alilandanoj notu, ke la angla matenmanĝo estas iom ampleksa).

Oni ankaŭ esperas aranĝi pli malkarajn loĝejojn.

La Organiza Komitato ne garantios loĝejon al iu ajn kongresano, kies aliĝilon ĝi ne estos ricevinta antaŭ la 1-a de julio.

**Manĝoj.** — La ordinara prezo por lunĉo en restoracio estas 1 ĝis 3½ ŝilingoj. La „temanĝo" kostas de 9 pencoj ĝis 2 ŝilingoj. La vespermanĝo, de 1½ ĝis 5 ŝilingoj.

**Fakaj kunvenoj.** — Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

**Oficiala organo.** — Ĉiu kongresano ricevos la gazeton The British Esperantist de januaro ĝis julio, kaj poste la numeron, kiu enhavos la raporton pri la Kongreso. Se kongresano jam abonas la gazeton, oni esperas, ke li ne ĉesigos la abonon, sed fordonos la duan ekzempleron por propagandaj celoj.

## PROVIZORA PROGRAMO DE LA KONGRESO.

| | |
|---|---|
| Sabaton . . . . . . | Interkoniĝa Vespero. |
| Dimanĉon . . . . | Oficiala Inaŭguro.<br>Diservoj.<br>Muzika Vespero. |
| Lundon . . . . . . | Laborkunsido.<br>Fotografado.<br>Teatraĵo. |
| Mardon . . . . . . | Fakaj Kunsidoj.<br>Neformala Vespero. |
| Merkredon . . . . | Tuttagaj kaj Duontagaj Ekskursoj. |
| Jaŭdon . . . . . . | Laborkunsido.<br>Fakaj Kunsidoj.<br>Internacia Balo. |
| Vendredon . . . . | Laborkunsido.<br>Popol-dancado kaj Koncerto. |
| Sabaton . . . . . | Fermo. |

## EKSKURSOJ.

Merkredo estos la tago de la plej gravaj ekskursoj. Okazos kvar, laŭ la jenaj detaloj:

1. Rondveturo en Shakespeare-lando, kun vizito al la Kastelo de Warwick, Stratford-on-Avon, (naskodomo de Shakespeare), kaj Oxford. Kosto: £1, inkluzive de tagmanĝo kaj temanĝo.

2. Simila rondveturo tra la bela suda regiono al Hastings kaj Eastburne, ĉe la marbordo. Kosto: kredeble 12½ ŝil., kun tagmanĝo.

3. Windsor kaj Hampton Court, kun vizito al la Palacoj. Kosto: 10 ŝil., kun temanĝo.

4. Al Whipsnade, la bela, natura zoologia parko en la kamparo. Kosto: kredeble 6 ŝil., inkluzive de la enirprezo.

Post proksimume du monatoj ni dissendos plenan informon kun mendiloj. Krom la supre-menciitaj, oni aranĝas multajn ekskursojn en Londono mem, matene, posttagmeze, kaj vespere. La kongresanoj ankaŭ povos partopreni ekskursojn sur la rivero Tamizo, kun vizito al la tre interesa havenego.

## POSTKONGRESAJ ARANĜOJ.

**A.** Sep-taga ripoza libertempo tuj post la kongreso en High Leigh, Hoddesdon. High Leigh estas bonege ekipita gastodomo en la beleta kamparo, proksimume 30 Km. de Londono. Dum la matenoj okazos prelegoj de la bone konata Cseh-instruisto Sigismundo Pragano pri la Literaturo de Esperanto. Posttagmeze okazos libervolaj ekskursetoj kaj vagadoj, kaj vespere koncertoj, dancoj, kaj neformalaj aranĝoj. La celo de tiu ĉi semajno estas, ke ĝi estu kvazaŭ ripozo post la kongres-tagoj. La kosto por la semajno estos £3½. Tiu prezo enhavas ĉion, kun la escepto de la tute malalta veturkosto de Londono. Car estas loko por nur cent gesamideanoj, frua aliĝo estas konsilinda.

**B.** Ankaŭ tuj post la kongreso okazos granda ekskurso al Skotlando. Mallonge la

detaloj estas jene: De Londono oni veturos fervoje al Glasgow, kaj la postan tagon okazos tuttaga aŭtoĉara rondveturo al Ardrishaig, de kie oni reiros al Glasgow per ŝipo sur la lagoj kaj rivero. La trian tagon oni ĝuos viziton al la grandioza Ekspozicio de la Brita Imperio en Glasgow. Je la sekvanta tago la karavano iros fervoje al Balloch, boate sur la fama lago „Loch Lomond" al Inversnaid, aŭtoĉare al Stronachlacher, boate sur „Loch Katrine" al Trossachs, Pier, aŭtoĉare al Callander, kaj finfine fervoje al Edinburgh. La matenon de la la kvina tago oni pasigos per rondveturo en la urbego, kaj la postan tagon okazos tuttaga rondveturo en la „Scott" regiono. Fine, post la interesplena semajno, oni la sepan tagon fervoje reiros de Edinburgh al Londono. Kosto, inkluzive de ĉio, iomete malpli ol £13.

**Vojaĝ-oficejo.** La oficiala kongresa vojaĝoficejo estas la mond-konata firmo Thomas Cook-Wagon Lits. La kongresa komitato esperas aranĝi pri rabatitaj biletoj en multaj landoj.

**Banko.** Kongresanoj povos ŝanĝi monon kaj fari aliajn bankaferojn ĉe speciala kontoro, kun Esperanto-parolantaj oficistoj, starigota de Midland Bank Ltd. (la plej granda banko en la mondo) en la Kongresejo.

**Presaĵoj.** En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkulerojn kaj ĉiajn aliajn presaĵojn nur post „antaŭa" aprobo de la kongresa komitato.

**Dokumentaro.** La sama postulo rilatas al presaĵoj disdonotaj kun la oficialaj kongresdokumentoj; tio estas, ili devos ricevi la „antaŭan" aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

**Kongres-afiŝo,** havebla ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo. Prezo: po unu internacia respondkupono.

**Por la Organiza Komitato**
**Cecil C. GOLDSMITH.**
**Sekretario.**

* * *

Poloj povas ricevi aliĝilojn kaj pagi kotizojn al la ĉefdelegito por IEL, **S-ro** Inĝ. **Michał Chmieliński, ul. Krasińskiego 4, Wydział Dróg Wodnych, Toruń.** *(Red.)*

*JULIUS OENGO.*

## *F I Ŝ I S T O.*

*Barbokadrita menton',*
*pipo enbuŝe vaporas,*
*sen rapidem' li moviĝas,*
*velon, remilojn surportas.*
*Raso de l'marregion',*
*nuko kaj sakroj tre fortas,*
*fere la membroj muskolas,*
*tamen bambue fleksiĝas;*
*klinus manpuŝ' geleason,*
*movas la fingroj sin lerte,*
*velojn flikante tre sperte;*
*ankaŭ tranĉil' dum malpacoj*
*vigle enmane svingiĝas.*

*Ĉiam soleca, medita,*
*kvazaŭ mar-foko aŭ laro;*
*lia ŝtalgriza okulo*
*ĉieldirektojn esploras;*
*penso, junaĝe senbrida,*
*ankaŭ impete nun bolas,*
*kvazaŭ marondoj sen baro*
*ŝaŭmas dum venta vetero.*
*Mankas je nov' ekpostulo*
*— kiel prapatroj — la fil'.*
*Barbokadrita menton',*
*brava, sen tim' dum danĝero*
*— raso de l'marregion'.*

*El la estona: Hilda Dresen.*

## FUNEBRA SCIIGO.

La 18 de februaro mortis Edzino de nia amata samideano mgr Tad. Hodakowski. Juna, 24 jara virino. Ni ĉiuj kundoloras tiun gravan perdon.

**LA REDAKCIO DE „POLA ESPERANTISTO"**
**ESTRARO DE P. E. D.**
**POLA ESPERANTISTA KLUBO, KRAKÓW**
**SOCIETO ESPERANTO, KRAKÓW**

*JULIUS OENGO.*

## *ENAKVIGO DE NOVA GALEASO.*

*Gudre vantoj kaj stajoj odoras,*
*jen incenso ĝuiga por nazo.*
*Oni ŝipkorpen hokojn enboras.*
*Streĉa atendo en ĉies mien', —*
*iuj ankoraŭ klopodas kun pen',*
*baldaŭ eknaĝos la galeaso.*

*Jen: „Hoj, hola! Ŝnuregojn for!"*
*De l'subtrabo jam cigne ruliĝas*
*ĝoj' de l'bordanoj, vivo kaj glor'*
*— ŝipet' kalfatrita, gudrita,*
*Tamen pri tio, ke ĉiu trabaĵ'*
*pruvas pri peno plej ŝvita*
*oni silentas. Malĝoj, kaj sklam'*
*pasas ĉi tie kviete.*
*Oni senvorte kaj mute,*
*vivon trenadas servute*
*tagon post tago, vegete.*

*Mute eĉ pasis la ŝipo-eknaĝ'*
*— gloro hodiaŭ, morgaŭ senvive*
*eble jam nigros la gafoj surrife*
*restos de l'penoj nur ruinaĵ'.*

*El la estona: Hilda Dresen.*

## B I B L I O G R A F I O.

**LA STRATO DE FIŜANTA KATO de Jolanta Földes.** Tradukis el hungara Ladislao Halka kaj Ladislao Spierer.

Libro eldonita de Literatura Mondo, kiu eldonis jam 56 aliajn legolibrojn. Broŝurita 1 dol. bindita 1,25 + 10% sendkostoj.

La libro jam estas konata en la tuta mondo. Aperis en pli ol 10 lingvoj. Ĝi estas legata kaj ĉie konata. La Aŭtorino ricevis grandan Literaturan premion. La libro rakontas pri la sorto de l' diverslandaj emigrantoj, kiuj forlasis kontraŭvole sian patrujon pro politikaj cirkonstancoj ŝerĉante panon kaj hejmon. En fremda lando ne pli ekzistas politikaj partioj. Homoj de diversaj konvinkoj vivas kaj klopodas kune. La zorgoj kreskas, ofte estas netoreleblaj, speciale kiam troviĝas kreitaĵoj sen etiko kiuj influas honestajn homojn kaj malutilas ilian ekziston. Unu fiaĉulo apartenanta al iu nacio malutilas ĉiujn aliajn nacianojn kiuj igas suspektaj kaj ne povas trovi laboron nek subtenon en fremda lando.

**POR LA HONORO DE NIA LANDO. Pledo por aviado super la militpensado de A. Viruly** ĉefaviadisto de K. L. M. El Nederlanda lingvo tradukis P. W. Van Sijn. Rotterdam, Hollando.

Tridek jarcentoj revadis Homoj pri aviado, pensante ke tio servos por plifaciligo de homa vivo. Sed nuntempe ni vidas, ke tiu - ĉi invento, tiom longe dezirata servas por plifaciligi la detruadon de homaj vivoj. Nuntempa aviado minacas dum la estonta milito neniigi ne nur la vivon de multegaj homaj vivoj, sed celas neniigi la tutan kulturon. Ĉiu pensanta homo devas scii pri tio kaj penadi al plibonigo de la homa naturo, kiu allasas nun similajn kruelaĵojn.

**MUUSSES ESPER. BIBLIOTEKO, Nro 10: JUBILEA ESP. KONGRESO 1912** (la Oka Kongreso en Kraków). Rememoraĵoj kaj Ofic. dokumentoj aranĝis kaj kompilis Julius Glück. Esp. Eldonejo: Muusses - Purmerend. Nederlando.

Ĉiu, kiu ĉeestis la lastan, Oran Jubilean Kongreson legas volonte malgrandan libreton supre menciitan. Por ĉeestintoj la Okan Kongreson en Kraków, tiu lerte skribita de J. G. libreto memorigas plej kortuŝajn momentojn. Ĉar tiu kongreso estis ja lasta, kie profundanime parolis La Majstro, jam antaŭsentanta sian mallongan restadon inter samideanoj Ne vane li nomis sian paroladon la „cigna kanto". Terura malsano kaj ankaŭ pli terura milito forrabis lin. Julius Glück skribis antaŭparolon por la tiama jubilea fotografia albumo. El tiu ĉi libreto oni vidas kiom granda estas disvolviĝo de nia lingvo post 25 jaroj. Ni ĉiuj estas tre dankemaj al la Aŭtoro kaj al Eldonisto.

**VIENA FOIRO, 13-19 de marto 1938** - publikigis belegan gvidfolion Foirpalaco - Pratertereno - entenas diversajn artikolojn, maŝinojn, laborilojn, diversajn industriaĵojn.

*O. B.*

## TRA LA GAZETARO.

**HEROLDO DE ESPERANTO, semajna, oficiala org. de IEL.** Januaro. Internacia Konkurso de IEL en 1937 donis bonajn rezultojn. La nombro de aliĝintoj jam alproksimiĝas al la necesa minimumo de anoj: 15.000. Espereble en la nuna jaro la cifero de minimumo estos facile atingota.

Federacio Espirita Brazileira oficiale akceptis Esperanton.

Al la Kongreso en Londono por 1938 aliĝis jam 825 personoj el 25 landoj. Grava sukceso!

En la februara n-ro publikigita interesa artikolo, en kiu oni citas voĉojn de multaj germanaj gazetoj pri entombigo de esperanto. Jen la konkludo: malgraŭ stultaj artikoloj, malgraŭ dekretoj, kies motivoj restas enigmaj, malgraŭ ĉia kontraŭeco por racia homo nekomprenebla, restas tre viva la dezirrevo de miljaroj, kiun ja ankaŭ la artikolverkinto agnoskas kiel ion tre dezirindan. Nu, tiu ĉi deziresprimo fariĝis fakto, kvankam ne jam 100 procenta, sed ĝi estas sur bona vojo al tio. Ankaŭ Romo kaj München ne estas konstruitaj en unu tago. Sed la tomboparoladoj de l' kontraŭuloj de la ideo de tuthomara interkompreniĝo, iliaj mortdeklaroj de l' internacia lingvo, certe restos dezirrevo nun kaj por ĉiam. Por tio zorgos ja ni, porbatalantoj de tiu ideo. Kaj pri tio oni devas esti certa!

La Westdeutscher Beobachter, Köln de 13.11.1937: Ĝi estas tiel interesa, ĉar en ĝi oni raportas ion, kion mi mem ne sciis, nome ke „estiĝis tutaj bibliotekoj eĉ de pornografiaĵoj". Sekve, konkludasla publiko, ekzistas en Esperanto sendube ankaŭ la bibliotekoj de la plej famaj verkoj de l' mondliteraturo, kaj do tiu lingvo tamen vivas kaj estas disvastigita. Ni scias (redakcio) nur pri unu esperantlingva verketo, „pornografia"; ĝi certe aperis sen aprobo, eĉ sen scio de iu oficiala instanco de l' Esperantomovado, restis ĝenerale kaŝita, kaj al la eldoninto ne donis profiton, sed preskaŭ fariĝis por li fatala.

Eĉ en Germanlando oni povis fakte nur neniigi la esper. organizojn, sed ja restis vivantaj la esperantistoj - la progresemaj homoj, kiuj formis la organizojn, kaj kiuj tenas en iliaj koroj karan aferon. Nun, kiam ili ne povas publike propagandi por Esperanto, en sia koro eĉ pli alkroĉiĝis al ĝi. Ni ĉerpas tiun scion el leteroj de alilandaj samideanoj, travojaĝantaj Germanujon kaj ankaŭ el leteroj de germanaj samideanoj mem.

**FLANDRA ESPERANTISTO. Org. de flandra Ligo Esp.** Antwerpen - Brussel. Estas 31 grupoj el diversaj urboj belgaj kiuj apartenas.

Prez. s-o Rainson dum la kunveno komunikas, ke jam 7 Cseh kursoj finiĝis, 37 estos finotaj baldaŭ kaj 19 novaj komenciĝos, Ĝis la marto estos kune ĉirkaŭ 100 kursoj.

**LA VOJO; monata gazeto por infanoj.** Amsterdam. Org. de Labor Esp de nederlanda lingvo. Bonegaj lecionoj kun belaj ilustraĵoj. Plej taŭga la gajo por infanoj.

**SENNACIULO. Senn. As. Tutmonda.** Av. Gambetta; Paris 20. nro 67. Ke flandraj kaj valonaj studentoj ne tute akordas rilate la lingvodemandon, estas fenomeno nek nova nek nekomprenebla. Multe pli altiras la atenton la maniero, per kiu ili klopodas solvi ĉi tiun malpacon. Evidente ili reciproke uzas por tio svinge kaj ĵete ovojn. Efektive la afero de tiuj studentoj estas paroli per la manoj, dum buŝo kaj cerbo estas inertaj. Oni ne subtaksu tiun modernan manlingvon, kiu faras ĉiam pli rapidan progreson kaj triumfprocesion en la mondo, kaj efektive komencas fariĝi MONDLINGVO, kun kiu kompare esperanto tute nenion valoras.

**BELGA ESPERANTISTO. Of. organo de Reĝa Belga Ligo Esp.** 44 av. De Bruyn. Antwerpeno. Dir. M. Jaumotte. Statuto por ekzamenoj. Programo, atestoj kaj kondiĉoj. Regularo de red. M. Jaumotte kaj de Fr-ino A. Jensen. Foto de la Liga prezidanto kaj de honorigo de s-ino Staes kaj F-ino Obozińska. Ankaŭ la foto de la partoprenintoj al la festeno de la Antwerpena grupo-Verda Stelo.

**FRANCA ESPERANTISTO. Of. Org. de la Societo Franca por la propagando de Esp.** En Franca Armeo jam estas enkondukitaj kursoj de Esp.

**THE BRITISH ESPERANTIST. Of. Org. de Brita Esp. As.** Februaro. Fr-ino Saxl jam komencis specialan kurson ĉe la Londona Esp. Klubo. Baldaŭ ŝi entreprenos la diversajn specialajn kursojn por oficistoj kaj laboristoj de la Kongresa Komitato. En la Londona Gazetaro kreskas interesiĝado por nia lingvo. Preskaŭ ĉiuj gazetoj de la lando mencias Esp. kiel unu el la lingvoj uzotaj ĉe British Industries Fair.

Postkongresa Rondvojaĝo en Skotlando 6-12 aŭgusto.

Plej granda urba transport-servo en la mondo portas ĉiutage 12,000.000 pasaĝerojn.

**NIA GAZETO. Monata esp. revuo eldonata de L' Eclereur de Nice et de Sud-Est. Januaro.** El la Lando de Simboloj — interesa artikolo pri Japanujo. Vuk Karadzic — Vilaĝano kaj reformanto de Serba lingvo. La Mondo en stato de renverso — tre interesa artikolo de dro Batek. La homoj devas venki plej grandan malamikon t. e. sin mem per interkompreniĝo kun aliaj.

Kelkaj tre interesaj originalaĵoj kaj tradukaĵoj.

**LA REVUO ORIENTA.** Februaro. El la sezonoj de Japanujo. Belaj fotografaĵoj de la vintra sezono kaj skiistoj. Gaumont, franca filmo: Jenny de Marcel Carne'. Artikolo de Dro Hazime Asada: Ĉu la ABO-sistemaj sangtipoj rilatas al la homaj temperamentoj?

Hipotezo de Prof. Furukava diras, ke A-tipo estas prudenta, hezitema, maldecidema, timema, pacienca. B-tipo estas decidema, malhezitema, kuraĝa, AB havas ambaŭ tipojn, O-tipo estas fortvola.

Priskribo de la disenteria epidemio en Oomuta, kiu venis el akvokondukilo. Sume estis 12.332 atakitaj personoj kun 608 mortoj.

Fuĵio Egami pruvas, ke alkoholo ne estas nutraĵo. Ne utiliĝas kontraŭ ekstera malvarmo.

Diversaj lingvaj studoj.

**ESPERANTO INTERNACIA; duonmonata org. de IEL.** La nova konkurso de IEL celas por 1938 atingi minimume 15.000 membrojn. Jam atingita cifero estas 13.487, do restas nemulto por atingi.

Imponas la ĝis nun atingita cifero de aliĝintoj al Londona Kongreso, jam pli ol 900. Sendube la Kongreso brile sukcesos kaj tio estos grandega propaganda paŝo por Esperant-movado.

Mi ĉiam opiniis, ke la sukceso de Esperanto kuŝas en la manoj de Britlando kaj de proksimaj ŝtatoj: Francujo, Svedujo, Nederlando kaj Belgujo. *(Red).*

T. J. treege taŭge difinas kaj simpligas la esprimon de Interna Ideo. Laŭ la aŭtoro tio estas ne nur buŝa sed ankaŭ kora interkompreniĝo de diverslingvaj homoj kaj nacioj. La gazetara servo de Malmgren (Kongreso en Varŝava) proponas, ke en ĉiu lando oni elektu gazetaran komisionon por prizorgi regulan servon, kolektantan esp-novaĵojn kaj ĉiumonate almenaŭ unufoje en ĝepatra lingvo dissendi ilin al diversaj landaj gazetoj. Oni povas legi pri konkurso aranĝita de la New History Society en New York. En tiu konkurso, en kiu la premioj sumis pli ol 5.000 dol. oni devis respondi al kelkaj demandoj, nome:

Ĉu vi aprobas la instruadon de internacia helplingvo en la lernejoj flanke de la nacia lingvo? se jes, ĉu tiu estu esperanto ĉu iu nacia lingvo? Alvenis 1108 respondoj por Esperanto kaj 842 por angla lingvo. Eĉ el Usono kaj Kanado alvenis plimulte da voĉoj por Esperanto.

Instruista kunveno en Londono priparolis viziton al lernejoj de la tuta lando kaj konstatis pligrandiĝon de la nombro de gelernatoj, kiuj studis Esp.

Interesa intersanĝo de letero de Cosmoglotta pri proponoj faritaj al Zamenhof en 1907 pri ŝanĝoj de la lingvo. Oni volis ke Zamenhof forlasu Varsovion, kaj prilaboru diversajn ŝanĝojn. Sed la afero entombiĝis.

Irlanda lingvo estas priparolata. Broad casting Dublin aŭskultu kaj gratulu. (Vidu „Radio" *Red.).*

La Retoromancoj de Peider Lansel. Prelego pri Malgranda parteto de popolo svisa, kiu prezentas restaĵon de iama roma provinco Raetia prima, parolas lingvon, kiu estas senpera ido de l' patrino latina. Estis unika okazaĵo, ke popolo voĉdonis pri la lingvo. Tre interesa artikolo pri lingvaj problemoj.

La danĝero de Japanaj narkotikoj. En la urboj Harbin kaj Fuschiatien ekzistas nuntempe pli ol kvarona miliono de narkotikmaniuloj. Granda danĝero por Eŭropo.

**INFORMA BULTENO AIT. Internacia Laborista Asocio.** Klariĝas la nunajn cirkonstancojn de interfrata mortiga batalado en Hispanujo, el la vidpunkto de antifaŝismo.

**UŜE — EĤO. Organo de Eŭropanismo.** Timisoara 1. Rumanio. Eld. Josef Zauner. La renaciiĝo de unuopaj eŭropaj ŝtatoj faras neatenditajn progresojn. Tiu ĉi renaciiĝa proceso estas natura reakcio kontraŭ marksizmo. Sed ĝi havas sencon nur, se la landa naciismo estos kronita de naciismo eŭropa. Ne estos firmaj la naciaj reĝimoj, se ili sekvos politikon de izolado. Aŭtarkia politiko por 3-60 milionaj ŝtatoj por la daŭro, estos memmortigo, se en la najbareco 170 miliona ŝtato faras la samon.

**L' ESPERANTO periodico di informazioni e comenti.** Milano. Galleria Vittorio Emmanuele 92. Dicembre 37. El Radio Roma: Goethe diras: La aero en Italujo estas pli varmeta kaj pura, la ĉielo pli blua kaj sennuba, la vizaĝoj pli malkaŝaj, afablaj, ridantaj, la formoj de la korpoj pli regulaj kaj allogaj, eĉ la verdaĵo de herbejoj kaj arboj ne tiom malvarma kaj senviva sed pli hela kaj varia ol en la nordaj regionoj.

**NORVEGA ESPERANTISTO. Org. de Norvega esp. Ligo.** Red. Liv Sandberg, Oslo. Sinsen Terrasse XX. 81.

**LA NORDA STELO. Hamar.** Oslo Esp. Klubo kaj Mara Vento havis siajn kunvenojn sufiĉe multnombrajn je la okazo de Zamenhofa festo. Estas interese, ke al Oslo kunveno alvenis por la letervespero 81 poŝtaĵoj, leteroj kaj poŝtkartoj. Fr-ino Else Wahl vendis multajn librojn. S-ro C Stop Bowitz parolis pri la Interna Ideo de esperanto. Fondiĝis provincasocio de Mara Vento en Odda Sauda Kaj Haugesund

**NEDERLANDA ESPERANTISTO; dusemajna Org. de la Asocio: La Estonto estas nia.** Februaro. En Vrije Geluiden, Org. de V. P. R. O. aperas ĉiutage informoj pri esp. movado. Aperas Radio rubriko de la Feder. de Lab. Esper. Pasintan jaron la biblioteko atingis rekordon disdonante 463 librojn.

**AMERIKA ESPERANTISTO. Monata bulteno de Esp. Soc. de Norda Ameriko.** Alvoko de Joseph Scherer al ĉiuj nordamerikanoj, ke ili nepre aliĝa al IEL.

**ARBEIDER ESPERANTISTEN. Org. de Norv. As. de Labor. Esp. Red: A.** Melbye Fagerheimstgate 30. Racie enkondukita paĝo por komencantoj.

**INTERNACIA S. O. S. BULTENO. Radio-club esper. de France.** Red. M. Alglave, Blanc Misseron. Nord Francujo. Post la doloriga morto de s-ano Dejean (11, 1, 38) la Bulteno estas sendata el Grenoble. Sekvas esp. Radio - programo por Februaro.

**PRAKTIKO. Red.: Int. Cseh - instituto.** Hago. Riouwstraat 172. Nederlando. Lernu per la eraroj. Eraroj trovitaj en diversaj gazetoj kaj libroj facile korekteblaj. Peto al la legantoj diskonigi al diversaj landaj gazetoj valorajn sciigojn propagandajn por Esp., ekz. Esp. en la franca armeo, Itala radioservo en Esp., la franca Radio disaŭdigas teatraĵojn en Esp., afiŝo en la stacidomo de Torino, irlandaj stacioj regule disaŭdigas paroladojn en Esp. Programo de la aranĝoj dum la somero en la Esperanto Domo en Arnhem. Tre utilaj sciigoj pri la aŭtomobilo. Belaj fotografaĵoj el diversaj esp. societoj. Inferio - interesa rakonto de Bulthuis. Informoj el diversaj landoj.

**ARGENTINA ESPERANTISTO. Arg. Esp. Asocio.** Red.: Missiones 369. Buenos Aires. Estas dek esp. centroj en Argentino. Bonega lingva studo de diversaj voĉoj de bestoj kaj birdoj ekz: la hundo bojas, la kato miaŭas, la bovo muĝas, la ĉevalo henas, la porko gruntas — en tute 26 diversaj „blekaĵoj" (el „La Praktiko"). Interese redaktata.

**ĜIS MIL. Monata Bulteno de la Universitata Klubo Lyon.** Jura Fakultato. 15 Quaie Claud Bernard. Kvina jaro. Januaro. Esp. kurso por instruistoj en Supera Instruista Lernejo por 40 instr. Ankaŭ en Villeurbanne por 50 lernantoj kaj kursoj komenca kaj perfektiga en Caluire.

**LA NOVA TAGIĜO. Bulteno de Lovena Sekcio de Flandra esp. Ligo.** Red.: Lode Cnops. Broekstraat 21. Leuven - Haverle.

**BULTENO DE INTERNACIA SCIENCA ASOCIO.** Tabelo de Enhavo: La koloro kaj ĝiaj elementoj de Toussaint, Pinte kaj Saget. Kelkaj vortoj pri novaj Relaŭtomobiloj kun belaj ilustraĵoj. Tiel ni iros ad astroj-scienca romano de XXIII jarcento, originale verkita de iu Nekonato. Novaĵoj el la Scienca mondo: kunordigo de diversaj tipoj de osciladoj. Nutraĵaj eksperimentoj. Malkomponigo de etileno per la varmo. Nova Instituto en Stokholmo por organika kemio. Japanaj scienculoj snr la marfundo. Paĝo de teknika Vortaro. Japana ortografio sankciita. Oficialaj sciigoj de la Akademio: kiel membroj de l' Akademio estas elektitaj s-roj Baghy, Belmont kaj Cseh. Kiel Prezidanto de Lingva Komitato estis elektita s-ro Isbrücker, ĉar s-ro Rollet de l'Isle rezignis. Por Vicprezidantoj Baghy kaj Grau Casas. Direktoro de la Sekcio-Komuna Vortaro s-ro Bailey. Dir. de la Sekcio - Gramatiko s-ro Cseh. Sekcio de Teknikaj Vortaroj s-ro Helleboid. Sekcio - Kontrolo s-ro Rollet de l' Isle.

**REFORMADOR** Nro 24. **- la organo de la Asocio.** Direktor Guillon Ribeiro-Sekretario Carlos Imbassahy - Aganto A. Wanfull de Freitas. Artikolo skribita sur ses paĝoj en portugala lingvo detale priskribas la eltrovon kaj konstruon de Esperanto, vivon de Zamenhof, kaj valoron de lingvo kiel interkomprenigilo por nacioj de la mondo.

*O. B.*

# RADIO.

## IV. KONKURSO INTER LA RADIO - AŬSKULTANTOJ DE LA „ITALAJ TURISMAJ KRONIKOJ".

La stacioj Romo I (metroj 420,8) kaj 2 R. O. (metroj 31, 13) disaŭdigas sabate la 27 de februaro je 19 h (M. E. T.) la lastan esper. prelegon de la Konkurso. Pluajn detalojn legu en januara n-ro de Pola Esperantisto.

* * *

La irlandaj radio - stacioj:

| | | |
|---|---|---|
| Athlone | (531 metroj) | |
| Dublin | (223 „ ) | relajso |
| Cork | (242 „ ) | „ |

disaŭdigas **ĉiumonate - la unuan dimanĉon de la monato** je 19·15 - 19·30 h. (M. E. T.) esper. prelegojn. Nepre aŭskultu kaj sendu gratulleterojn al **Radio - Stacio en Dublin.** De via subtenado dependas la sorto de la prelegoj!

* * *

La 27 II Hilversum (301 metroj) je 23·40 h (M. E. T.) - parolado.

La 28 II Sottens (443 metroj) je 18·20 h (M. E. T.) - parolado.

La 28 II Radio - Paris (1.648 metroj) je 24 h (M. E. T.) - teatraĵo.

La 28 II Roma (420 metroj) kaj Roma 2 RO (31,13 m) je 22 h (M. E. T.) - parolado.

## SKOLTA ANGULO.

**(Red.: S-o Józef Toczyski, Lwów)**

**Kursoj.** Ni ĝoje notas, ke en Wronki (Granda-Polujo) frato Wenclewski gvidas E-kurson por skoltoj — kaj eĉ dum januaro aranĝis propagandan ekspozicion.

**Skaut** en Lwów, en lasta, januara numero aperigis longan artikolon pri 80-jara datreveno de naskiĝo, de eminenta pola esperantisto, kaj granda amiko de skoltismo, prof. Dro Odo Bujwid. En venonta numero (februara) de Skaut, artikolo ĉi tiu aperos en esperanto. Postulu gazeton de Redaktejo: Lwów, Kurkowa 12.

**S. E. L.** De momento, en kiu pola skolta estraro oficiale aprobis SEL agenton por Polujo, movado iomete plivigliĝis. Vekiĝis intereso por esperanto ĉe diversaj skoltaj eminentuloj, en kelkaj ĵurnaloj skoltaj aperos varb-artikoloj — kelkaj novaj anoj aliĝis al SEL. Ni esperu, ke iam venos por esperanto inter pola skoltaro pli da komprenemo kaj ekintereso.

## POLLANDA KRONIKO.

**KALISZ.** Ĉe la Juda Landkonema Asocio okazis du E-kursoj. La unuan, kun 8 partoprenintoj, gvidis s-anino Mgr. E. Ŝindelman; la duan, kun 10 partoprenintoj, s-ano H. Grunis. La Esp. Rondeto kunveniĝas unufoje semajne; nun ĝi plinombriĝos per la ĝus finintoj de la dua kurso. La grupo aliĝis al P. E. D.

**LUBLIN.** Nia Esp.-grupo, unuigita en la societo „Kultur-Liga" elmontras viglan agadon. La sekcio posedas 15 bone parolantaj s-anoj, kunvenantaj por konversacii 3-foje en semajno. La novan kurson, lerte gvidatan de S-ro A. Sanik, partoprenas 35 personoj. La aranĝitan propagandan lecionon ĉeestis 100 pers. La grupo abonas 2 gazetojn kaj havas sian bibliotekon. La 15 de decembro oni aranĝis Zamenhofan memor-vesperon; ĉeestis 65 pers. Parolis s-oj Sanik kaj Etinger; versaĵojn de Grabowski tre bele deklamis f-ino R. Rosensztejn. La grupo forte propagandas Esperanton.

**LWÓW.** Same bonsukcese kiel la Zamenhofa vespero, prezentiĝis la solenaĵo honore al Profesoro Odo Bujwid, okazinta la 2-an de Februaro. Kunvenis multaj amikoj, kiujn salutis nia Prezidanto S-ro Józef Toczyski. Li faris interesan paroladon pri estimata Prof. Bujwid, kiu ni ĉiuj honoris per longdaŭra aplaŭdo.

Lernantino de Mgr. N. Herr, fraŭlino Roma Kristian lerte recitis poemojn, 14 jara fraŭlineto deklamis kaj blinda samideano pianludis.

La reston de la vespero ni pasigis bone regalitaj per frandaĵoj, kaj gaja babilado.

* * *

Kurson superan gvidas Mgr. N. Herr, komencajn promesis gvidi fraŭlinoj Nadel kaj Steiger. *(M. M.)*

**KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ EN LWÓW.** Esperantista Katolika Rondo ĉe Societo Esperanto en Lwów — aranĝis 22 januaron solenan „oblatan-vesperon", kiun partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj. La vesperon agrabliĝis per ĉarma deklamado de polaj kaj esperantaj versaĵoj konata lvova deklamatistino Wala Sołtysikówna.

## NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

**EL BRAZILO NIA ŜATATA SAMIDEANO ISMAEL GOMES BRAGA** sendas sciigon pri granda sukceso. Nome: Grava Federacio „Espirita Brazileira" anoncis sian decidon oficiale propagandi kaj helpi disvastigon de nia lingvo. Ĝia librovendejo malfermis riĉan fakon de libroj en kaj pri Esperanto. La 54 jara senĉesa progresado de tiu Federacio, kies ĉefoficejo okupas nun tri grandajn domojn en Rio de Janeiro - Av. Passos 28, 30 kaj 32, kies grandaj filioj floras en ĉiuj urboj de la lando, estas sufiĉe grava garantio por la estonto de Esperanto en Brazilo.

*O. B.*

Dana samideano sendis al ni eltondaĵon el la grava ĵurnalo »Politiken«, de 4/II 1938, kiu enhavas la jenan artikolon:

### ŜTATA SUBTENA KOTIZO AL ESPERANTO-INSTRUADO. CIRKULERO DE LA INSTRUA MINISTERIO.

La instru-ministerio decidis dum la lastaj tagoj, ke estonte ŝtata subteno ankaŭ devas esti havebla el Esperanto-instruado en la porjunulaj kaj vesperaj lernejoj. En cirkulero pri tio al la lernejo-direkcioj kaj urbkomunumaj estraroj oni legas: Konsiderante

la intereson, kiu ŝajnos esti pri Esperanto, laŭ la sinturnaĵoj direktitaj al la ministerio, kaj ĉar la valoro de ĉi tiu artlingvo kompreneble dependas de ĝia disvastiĝo, la ministerio opinias devi faciligi la partoprenon en la Esperanto-instuado, interalie ankaŭ per dono de permeso ke estonte ankaŭ subteno al Esperanto-instruado devos esti havebla en porjunulaj kaj vesperaj lernejoj.

### III-a KORESPONDTURNIRO DE ŜAKISTOJ-ESPERANTISTOJ.

Ne multaj samideanoj scias, ke sveda ŝaka revuo Schackvärlden (Göteborg 1) enhavas en ĉiu numero 1 - 2 paĝojn en esperanto. La esp. - fako de tiu ĉi revuo organizis jam du korespondturnirojn. La unuan, en j. 1932/4 partoprenis 13 samideanoj el 6 landoj, la duan, kiu komenciĝis en januaro 1937 kaj finiĝos en unua duono de tiu ĉi jaro, partoprenas, pro ne tro bona antaŭa propagando, nur 7 samideanoj el 5 landoj. La venonta turniro, jam tria, komenciĝos en septembro aŭ oktobro 1938. Jam nun estas certa partopreno de samideanoj el 5 landoj (Germanujo, Litovujo, Svedujo, Nederlando kaj Ĉeĥoslovakio). Oni esperas, ke la III-an partoprenos kelkdekoj da samideanoj el multaj landoj. Oni ludos en grupoj po 7 - 8 partoprenontoj. La unuaj tri en ĉiu grupo ricevos premiojn. La aliĝkotizo estas 5·— svedaj kronoj. Baldaŭ aperos speciala numero de Schackvärlden kun detalaj kondiĉoj de turniro. Se vi interesiĝas pri turniro kaj deziras ricevi detalajn informojn pri ĝi, skribu al **Torsten Lindberg, Prässebo, Svedujo.** Li jam akceptas aliĝojn.

*v. f.*

# KATOLIKA ESPERANTO MOVADO.

## XXXIV-a EŬKARISTIA MONDKONGRESO EN BUDAPEST.

## I-A EŬKARISTIA ESPERANTO-MONDKUNVENO.

**Kardinalo d-ro Theodor Innitzer, ĉefepiskopo de Wien, celebros la Sanktan Meson.**

### La Katolikaj Kultursemajnoj en Wien kaj Aŭstrio antaŭ kaj post la Kongreso.

La reprezenta kaj programa aranĝo en la jaro 1938.
De kardinalo ĉefepiskopo
d-ro Theodor Innitzer.

La Eŭkaristia Mondkongreso antaŭ la pordoj de Wien — ĉi tiu signalvorto, alarmanta kaj kunveniganta la tutan katolikan mondon al eŭkaristia festo de la popoloj, devas esti aŭdata de ni aŭstrianoj katolikaj kun speciala intereso. La migrado de la mondo al Eŭkaristia Kongreso en Budapesto grandparte iros trans Aŭstrio. Ni plifortigos ĉi tiun migradon el niaj vicoj — sed ni ankaŭ uzos la tagojn kaj semajnojn, dum kiuj dekmiloj da katolikoj el ĉiuj nacioj dum sia pilgrimvojaĝo traveturos Aŭstrion, por grandioza aranĝo kaj reprezentado de la aŭstria katolicismo.

La mondo interesiĝas pri la nova Aŭstrio kiel ŝtato kun katolikaj organizprincipoj. La internacia amaso de fremdlandaj pilgrimoj ekkonu la katolikan Aŭstrion vigla en ĝia kulturforto, klare montrata en ĝia nacieco kaj ĝia historio, altgrada en ĝia muziko kaj en la aliaj belaj artoj, energia en ĝia pensmaniero kaj volo. La vasta katolika mondo, kiu dum printempo 1938 venos al Aŭstrio, konatiĝu kun niaĵ plej bonaj tradicioj kaj plej fortaj talentoj sur artaj kaj spiritaj kampoj, ĝi vizitu sub nia gvidado la aŭstriajn lokojn de la Dia Graco, de la kristana historio, de la katolika kulturo en Aŭstrio, ĝi trovu sur niaj scenejoj la teatraĵon kaj en niaj koncertejoj la muzikon kun kristana substanco kaj kun ni konsilu pri la aktualaj problemoj de la katolika kulturo.

De la 22 de majo ĝis mezo de junio 1938 la programo de Katolikaj Kultursemajnoj donos en Wien kaj en la federaciaj landoj la kadron por ĉi tiuj aranĝoj.

Mi petas ĉiujn aŭstrianojn katolikajn unuigi volon, kapablon kaj talenton en ĉi tiu kulturfortoprovo de la katolika Aŭstrio kaj fine ankaŭ doni ilian monan subtenon al ĉi tiu ideala entrepreno.

Sed al ĉiuj pilgrimuloj en la mondo, kiuj sin preparas al la veturado al Budapest, jam hodiaŭ mi alvokas: venu dum via vojaĵo al la katolika Aŭstrio, ĝi montros al vi la antikvan nobelecon de sia katolika kulturo, la junan movoforton de sia katolika koro, la verkojn de siaj vivaj talentoj. Festu kun ni modernan kaj laŭ longa tradicio aranĝitan feston de katolika kulturo.

Aŭstrio malfermas siajn pordegojn al la partoprenantoj en la 34 Internacia Eŭkaristia Mondkongreso. La katolikaj muziko kaj poemarto, la kristana teatro kaj ĝia bela arto,

la famaj abatejoj, monahejoj kaj pilgrimejoj, la spirita kaj arta eminentularo kaj la nacieco de Aŭstrio en sia profunda katolika pensmaniero vokas la mondon al la Katolikaj Kultursemajnoj dum majo kaj junio 1938 al la katolika Aŭstrio!

En la kadro de ĉi tiuj kultursemajnoj okazos la estrarkunsido de internacia Unio de Katolikaj Virin-Ligoj kaj la Tutaŭstria Virinkunveno. *Trad. Steiner.*

★ ★ ★

## 1-a EŬKARISTIA ESPERANTO-MONDKUNVENO.

**Kardinalo d-ro Theodor Innitzer, ĉefespiskopo en Wien, celebros la Sanktan Meson la 27 de majo en Budapest.**

XXXIV-a Eŭkaristia Mondkongreso okazos en Budapest, Hungarujo, inter 26—29 de majo 1938.

La tuta katolika mondo solenas ĉiun duan jaron en alia urbo sian Eŭkaristian Mondkongreson kaj tiuj kongresoj estas sendube la plej grandiozaj religiaj demonstracioj de la nuna epoko.

La nombro de la sinanoncintoj por la 34-a Internacia Eŭkaristia Kongreso estas tiom granda rilate al la disponeblaj loĝlokoj, ke oni baldaŭ estos devigata rifuzi la akcepton de pluaj aliĝoj.

Kiu volas ĉeesti, do kiel eble plej baldaŭ aliĝu!

La 1-an Eŭkaristian Esperanto Mondkunvenon povas partopreni nur tiuj, kiuj unue aliĝas al 34 Int. Eŭkaristia Kongreso kaj al tiu ĉi oni povas aliĝi nur pere de la koncernaj landaj komisionoj aŭ, kie tiaj ne ekzistas, pere de la tieaj vojaĝoficejoj. Per tiu aliĝo ankaŭ loĝado kaj manĝado estas certigata.

Kiuj deziras ĉeesti 1-an Eŭk. Esp.-Mondkunvenon devas tion sciigi ankaŭ al Subkomitato, Budapest, Petőfi Sándor u 9/IV 3, aldonante 4 int. poŝtresp. kup.

Laŭ peto de la Komitato kort. kons. Steiner en Wien petis aŭdiencon ĉe Lia eminenca moŝto la kardinalo de Wien d-ro Theodor Innitzer, kiu en afabla maniero konsentis celebri la meson dum la E.-mondkunveno.

Budapest, la bele situata ĉefurbo de Hungarujo invitas vin!

## GRAVA AVIZO!

Budapest, la urbo de la kongresoj, atingis en la lastaj jaroj ĉiam pli grandan intereson de la eksterlando.

La ĉefurbo de Hungarujo fariĝis per siaj mondfamaj sanigbanejoj kaj refreŝigejoj la celo ne nur de la sanigon serĉantoj, sed ankaŭ de turistoj kaj speciale de la sportamantoj. Sur la kontinento kaj trans la maroj oni ekatentis la regionon de la Danubo.

La hungararo havos en la jaro 1938 duoblan sanktan jaron. La sekvonta XXXIV-a Internacia Kongreso okazos kun bontrovo de Lia Papa Moŝto, Pio la XI-a, 24—30 de Majo 1938 en Budapest; el la tuta mondo jam ĝis nun proksimume 500.000 katolikaj kredantoj anoncis sian partoprenon.

Al la kongreso kuniĝos la nacia festo de Hungarujo. La civitanaro de la miljara Hungarujo, sen diferenco de religio kaj nacieco, je la 900-a datreveno de la morto de sia unua, sanktuligita reĝo Stefano, kliniĝos antaŭ la memoro de la fondinto de la hungara reĝlando.

Por tiu okazo la redaktejo de la REFLEKTOR jam nun pretigas por la presejo sian plurlingvan turisman informilon, — luksan, proksimume 450 paĝan maldika-biblia-paperan, 12×18 cm formatan, tolbinditan, ilustritan verkon ne nur en la lingvo de la kulturŝtatoj, sed ankaŭ en la internacia lingvo ESPERANTO. La nin vizitanta fremdulo trovos en ĝi ĉion, kio interesas lin, eĉ pri tio ni zorgis, ke oni savu la fremdulon de uzado de vortaregoj kaj oni trovos en la verko plurlingvan, — do ankaŭ esperantan, — interpretiston, kio estas uzebla en ĉiu lando por konversacio.

Tiun ĉi luksan, en la poŝo facile porteblan informilon, ni presigos en 40.000 ekzempleroj kaj ni ricevas tian kvanton de de mendoj ĉiutage, ke ni estas devigataj peti la internaciajn-ESPERANTO societojn, asociojn kaj la redaktejojn de la plej disvastiĝintaj ESPERANTO-gazetoj, ke ili bonvolu kun ni plej urĝe konigi la necesan nombron por siaj membroj kaj aliaj interesigantoj, ke ni ne perdu la eblecon mendi en la presejo la necesan kvanton.

Ni petas la estimatajn Estrarojn, bonvolu la mendojn kolektinte al ni sendi kaj ni proponas post ĉiu mendo el la prezo 25%-on por plua progresigo de Esperanto aŭ por ia ajn alia celo.

La libro kostos en la jam menciita luksa eldono, enkalkulinte la poŝtelspezojn 4 pengo (Kvar pengo) aŭ samvalora alia mono.

Atendante viajn tre ŝatatajn mendojn ni restas

kun estimplena saluto

**REFLEKTOR**

**eldonejo de propagandaj verkoj**
**Budapest VII, Rottenbiller ucca 6/B I. EM. 6.**

---



**GVIDANTOJ DE DAŬRIGAJ KURSOJ**

kiuj deziras ricevi TUTE SENPAGE la duan eldonon de la Plena Gramatiko de Esperanto en la redakto de Kalocsay-Waringhien - 500 paĝa grandformata libro, kun densa komposto kaj vendoprezo de usonaj dolaroj 2'86, skribu tuj pri tio al la eldonejo:

**Literatura Mondo, Budapest IX. Soroksári ut. 38. Hungarujo, aŭ al sia kutima libroliveranto.**

---

**10 dolarcendojn**

kostas ekzemplero de

**Literatura Mondo,**

se vi mendas kolektive kun la grupanoj almenaŭ 10 ekzemplerojn. Unu ekzemplero ricevebla por 14 dolarcendoj. Jare 16 numeroj, po 16 paĝoj, kun la aldonoj. Abonkotizo por jaro 1'80 USA dolaroj aŭ egalvaloro. Postulu specimenon kontraŭ respondkupono de **Literatura Mondo, Budapest, IX. Soroksári - str. 38.**



**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABONANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA ABONON POR J. 1937 PAGI LA ŜULDON JE NIA KONTO PKO Nr 406.660.**

---



Cu vi jam legis la rakonton de

**Henryk Sienkiewicz: Orso**

trad. A. Oberrotman.

**Prezo: zł 1'10 kun afranko.**

Mendu tuj ĉe „Pola Esperantisto"
Kraków, Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.



---

**UWAGA!**

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto" uskuteczniać można na konto PKO. Nr 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr 29,** co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki

---


ABONO: jare zł 8'—, duonjare zł 4'—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6'—. Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0'70, duobla zł 1'40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł 30'—, 1/4 paĝo zł 15'—, 1/8 paĝo zł 10'—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1'—.

PRENUMERATA: rocznie zł 8'—, półrocznie zł 4'—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6'—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0'70, podwójny zł 1'40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 30'—, 1/4 strony zł 15'—, 1/8 strony zł 10'—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1'—.

Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406. 60.

Wykonano w Drukarni Miejsk. Muz. Przemysłowego w Krakowie. Redaktor odpowiedzialny: Dr Leon Rosenstock.